

Caroline Keppel,
Sen la karul'

tradukita de Adela Schafer

Ĉio tedegas min -
forestas li!
Ĉio malplaĉas nun
sen simpati'.

Ĝojo kaj feliĉec'
forflugis pro tedec';
ho, mi ploregas nun
sen la karul'.

Ĝaje moviĝis mi
en la dancad';
kun li koncervesper'
estis ĝuad'.

Sed post la ekforir'
regadis min dezir',
kaj sopiradis mi
al la karul'.

Min, kruelulo , nun
ne amas vi!
Kial forflugis jam
korsimpatia'?

...

Lin eĉ en malesper'
nur amas mi sur ter',
kaj restas kun mizer'
sen la karul'.

*Traduko de la Angla poemo "Robin Adair" de CAROLINE KEPPEL (*1734 – †1769) en Esperanton de Adela Schafer.*

Arg-1025-2078 (2014-05-28 13:34:56)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio, sur la paĝo 50 kaj 51. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Tie estas, verŝajne erare, indikite, ke la origina angla-lingva teksto estas verkita de la skota poeto Robert Burns.